# Babiladaj rondoj

… okazos je la 19-a, vendrede …

## la 2-an de oktobro

ĉe M.-Antoinette kaj Knud Sunier
Avenue des Alpes 150, Montreux
021 961 38 56 / 079 210 97 75

## la 23-an de oktobro

ĉe François Randin
Ch. de Vallombreuse 14, Lausanne
021 647 29 28 / 076 411 14 55

## Ne forgesu aliĝi ĉe:

http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd#

## kaj por la bazaro ĉe:

http://doodle.com/fbzxwameyqwivvhz

# Citaĵo

Se vi volas ekkoni homon, rigardu lian laboron.

Ŝilero

# Por rideti

Eta Joĉjo litumas. Lia patrino vokas.
Jozefino: Joĉjo, estas la horo por ellitiĝi !
Joĉjo: Ĉu mi devas ? Estas sabate !
Jozefino: Jes, eĉ sabate. Ĉu vi ne aŭdis ke "Estas la birdo kiu frue leviĝas, kiu kaptas la vermon" ?
Joĉjo: Jes, panjo, mi konas tiun proverbon. Sed konante mian tipan malbonŝancon, estos MI la vermo !


## Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
**www.facebook.com/societedesperanto.lausanne**
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

Oktobro 2015 – n° 8

Ĉe "Espace Dickens", Dickens 6, Laŭzano, dimanĉe **la 4-an de oktobro** je la 10-a
**Manuel Rovere estros kantatelieron**
kaj je la 15-a, **li koncertos publike**
Venu multnombraj kun viaj amikoj

Lunde, **la 5-an de oktobro** je la 20-a,
**nia kantisto prelegos pri sia metio**

**Lunde, la 2-an de novembro, je la 20-a**
*Karlota (Charlotte Blanc Maillard) prelegos pri la 100-a Universala Kongreso en Lillo.*

**Sabate la 19-an de decembro**
*Zamenhofa festo*



# Novaĵo

**Vizito en Laŭzano de la kunprezidanto de S.E.S.**

Pro peto de nia estraro ni ricevis lundon la 7-an de septembro 2015 Dietrich Weidman, kunprezidanto de la SES. Ni bonvenigis lin en la bufedo de la stacidomo de Laŭzano, kie ni kune vespermanĝis. Poste ni atingis nian novan lokon « Espace Dickens », kie atendis nin aliaj membroj.
La celo de la prelego estis : scii pli pri la svisa societo. En nia lando Esperanto aperis en 1988, kaj la fondaĵo de la svisa klubo ekzistas ekde 1903, dank' al S-roj Edmond Privat kaj Hector Hodler. Ili partoprenis en la unua Universala Kongreso (UK) en Bulonjo-ĉe-Maro en 1905. Poste en 1906 ili majstre organizis la UK-on en Ĝenevo. Sekvis aliaj, en 1913 en Berno, en 1925 en Ĝenevo, 1939, kaj 1947 en Berno, en Luzerno en 1979. U.E.A fondiĝis per Hector Hodler en 1908. Dum la 2 mondmilitoj el Ĝenevo UEA multe helpis malaperintajn esperantistojn en la militaj landoj, transsendis leterojn, donis esperon.
Laŭ la lasta Jarlibro estas 170 membroj en Svislando sed laŭ Facebook certe estas proksimume 1000 E-o parolantoj. En nia moderna mondo la junuloj ne plu bezonas klubojn. Tio faras la diferencon.
La komitato enhavas 6 personojn :
2 kunprezidantoj, S-ro Dietrich Weidmann (pli specife por la germana parto de Svislando) kaj S-ino Mireille Grosjean (pli specife por la franca parto), Nelida Weidmann, respondulino pri SFERO, Oxana Grazhdanova, kasisto, Dieter Rooke kaj Sonia Daubercies, helpantoj. En Svislando ekzistas 6 kluboj : La Chaux-de-Fonds, Ĝenevo, Zuriko, Wil, Basel kaj Laŭzano. En la Chaux-de-Fonds troviĝas Kultura Centro Esperantisto (KCE), kiu longe estis la koro de la movado, kaj la Centro de Dokumentado kaj Esploro de la Lingvo internacia (CDELI), kiu troviĝas en la urba Biblioteko. Studsabatoj okazas ofte en tiu loko. Grava estas la esperanta lernejo "La Granda Ursino", kie la infanoj lernas dulingve france kaj esperante. Tie estras Monika Molnar el Hungario kaj Anke el Nederlando. Ĉiu klubo sekvas sian propran vojon sed estus bone, se estus pli da rilatoj inter ili. Veras, ke ne ofte ni scias, kion faras la aliaj ekster la Ĝenerala Asembleo.
La Ĝenevanoj kun novaj junaj membroj alportas novan sangon kaj certe tio estos tre bone por la estonteco de la lingvo. Ankaŭ nia Laŭzana Klubo proponas kursojn, babiladajn rondojn, kunsidojn, prelegojn, ktp... Venontaj gravaj eventoj estos komence de oktobro koncerto kun Manuel de la Rovere, fama esperantista kantisto el Italio (vidu la afiŝon), kaj ekde la 27-an de oktobro dum 2 semajnoj en Laŭzano, Place de la Palud, okazos ekspozicio pri la fenomeno Esperanto (vidu ĉi-sube). Tio eblas dank'al Francisko Randin, kiu senlace ekde pli ol 20 jaroj agas pri nia klubo.
Je la 21-a s-ro Weidmann jam forlasis nin, ĉar la trajno ne atendas. Li lasis nin kun ankoraŭ multe da demandoj.

Charlotte Blanc Maillard

# Informo

La Laŭzana Esperanto-Societo preparas kaj prezentos en la urbodomo ĉe la « place de la Palud » en Laŭzano ekspozicion pri la internacia lingvo. Ĝi nomiĝas :



## *FENOMENO ESPERANTO*

Ĝi estos malfermita ekde la 27-a de oktobro ĝis la 7-a de novembro. Ĉiuj tagoj, krom dimanĉe, inter la 10-an kaj la 18-an.

Oni povos vidi la diversajn aspektojn de Esperanto : la agojn en Laŭzano kaj en Svislando, kelkajn klarigojn kaj regulojn pri la lingvo, ĝian historion, filmojn.

La celo estas konigi al la loĝantaro de nia regiono, kiel Esperanto ĉiam kaj ankoraŭ vivas, ke ne estas revo aŭ ĥimero, sed estas realo. Ke ĝi estas malfermo al la homaro tra la tuta mondo. Venu viziti ĝin kaj konigi ĝin ĉirkaŭ vi ! Varbu pri tiu ekspozicio kaj pri esperanto !

Se iu inter vi havas tempon kaj deziron, li aŭ ŝi povas alvoki François Randin (076 411 14 55) por diskuti pri helpo.